

Leterkesto 3.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1990 oktobro 18.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-22/SRI-1990-22-A-3-Claude-kaj-Andree-Gacond-Leterkesto-3.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas hodiaŭ nian salutadon al la aŭskultantoj, kies mesaĝoj plenigis nian leterkeston. Ni revenu al letero de nia rusa aŭskultanto, Vladimir BESPALOV en Soĉi, Sovetio, ree citante lin:

A.- Mi ege ĝojus konatiĝi kun vi persone. Se tio ne eblas, mi volus ricevi vian familian foton.

Cl.- Ni volonte sendos foton de ni ambaŭ al tiu rusa aŭskultanto kaj ankaŭ al la aliaj aŭskultantoj, kiuj esprimos la deziron vidi nin sur foto. La urbo Soĉi etendiĝas borde de Nigra Maro flanke de Kaŭkazo. Tie la klimato estas milde subtropika kaj kreskas plej diversaj vegetaĵoj. Unu el ili estas konata sub la nomo de arbo de amikeco. Temas pri citruso, kies branĉojn greftis vizitantoj el plej diversaj landoj kaj medioj: sovetaj kosmonaŭtoj kaj usonaj astronaŭtoj, reprezentantoj de 152 landoj de la mondo partoprenis la greftoceremoniojn. Rezulte videblas tre diversspecaj fruktoj sur la sama arbo, kaj tio simbolas la kunlaboron, kiu devus ekzisti inter la homoj el la tuta mondo.

Dankon al Günter Becker, kiu salutis nin poŝtkarte el la 75-a Universala Kongreso en Kubo. Ni salutas L. H. BRANS en Veghel, Nederlando.

Alex BUYSSE en Doorslaar, Belgio.

2 mesaĝojn ni ricevis de Jean CALAMY en Aubagne, Francio:

A.- Pro malsano mi estis devigita vendi mian vilaon tutapude belan pinarbaron por vivi en apartamento en la urbo Aubagne. Tamen, el la fenestro de mia dormoĉambro mi ĝuas belan vidon al la monteto Garlaban, monteto kiu estis kara al la koro de nia fama loka verkisto Marcel PAGNOL. Feliĉe mia sanstato iom reboniĝas kaj nun mi prenas denove la kutimon ŝalti trifoje semajne mian radioaparaton sur la Esperantaj elsendoj de Svisa Radio Internacia. Ĉiufoje mi notas sur libreto la titolojn de la elsendoj kaj ofte mi registras ilin, precipe kiam temas pri la movado aŭ la historio de Esperanto... Mi dankas vin pro via tre bona laboro. La idealo estus, ke la elsendoj daŭru iom pli longe.

Cl.- En la revuo MONATO, julio 1990, aperis tre supraĵa recenza artikolo pri la radioelsendejoj. Nia kolego d-ro Arthur BAUR prave reagis per artikolo, kiun ni esperas, vi havos la okazon legi en la rubriko de la legantoj.

Jean CALAMY reagis sendante al ni poŝtkarton kun tiuj ĉi vortoj:

A.- Mi ĵus legas en la julia MONATO mizeran recenzon pri viaj radio-elsendoj. Ĉar mi malkonsentas kun sinjoro GREEN, mi deziras sendi al vi mian tutan subtenen por via agado, kiu plene kontentigas min. Hundoj bojas, karavano trapasas.

Cl.- Saluton al Michel DARTIGE en Rennes, Francio.
Jacques DONY en La Ricamarie, Francio, prezidanto de la Esperanto-Klubo en St. Etienne.

Charles FIELD en London, Britio skribis:

A.- Estus bone se vi povus plilongigi la elsendon de dek minutoj ĝis tridek.

Cl.- Josef FISCHER en Nordwalde, Germanio okcidenta, skribis el sia feriloko Neuhaus en la arbarriĉa regiono Solling ĉe la rivero Weser, kie li aŭskultas nin per portebla ricevilo.

Charles GALVIN en San Francisco, Kalifornio, Usono, sin nomas nova aŭskultanto de Svisa Radio Internacia:

A.- Post 5 jaroj de Esperantisteco mi finfine aĉetis mallongondan radio-aparaton. Malĝojis mi, kiam mi ne trovis vin ĉe kelkaj frekvencoj pro fortaj intervenoj kaj aliaj dissendoj. Sed efektive mi ja aŭskultis la hodiaŭan dissendon je 12,035 Megahercoj. Kiam mi ekaŭdis viajn voĉojn, mi subite trovis min en la ĉielo! ĝis baldaŭa reaŭdo!

Cl.- Guido GENTILE en Treviso, Italio, petas nian esperanto-programon, dirante sin nova aŭskultanto.

La esperanto-komencanto Jurij GAVRILOV en Ruhland, Germanio orienta skribis:

A.- Mi ne multe scias Esperanton kaj tial kun granda intereso aŭskultas elsendon.

Cl.- Dankon al la vidhandikapito Adam CORALSKI en POZNAN, Pollando, kiu sendis sonkasedon.

Cl.- Franta HAVLIK en Hodonin, Ĉeĥoslovakio, skribis, ke por li renkonto kun papo Johano Paŭlo 2-a en Velehrad estis neforgesebla travivaĵo. Tie li renkontis ankaŭ aliajn esperantistojn.

Niaj elsendoj helpas komencantojn. Edward HARPE en East Dennis, Usono, skribis tiurilate:

A.- Mi aŭskultas al viaj elsendoj en Esperanto ĉiun semajnon. Ĉi tiuj programoj helpas min lerni la lingvon... Mj havas malmultan okazon aŭdi parolatan Esperanton, kie mi loĝas.

Cl.- Juha HEIKKINEN en Nastola, Finnlando, eklernas ankaŭ esperanton per niaj elsendoj.

Cl.- Gustavo INCAPIE en Santa Fe - Antioquia, Kolombio, skribis germanlingve por peti esperanto-kurson.

Cl.- L.L. HORDIJK en Vlaardingen, Nederlando skribis:

A.- Mi ofte aŭdas viajn elsendojn sed ne skribas ĉiun fojon.

Cl.- Peva HOUDOVA en Pribram, Ĉeĥoslovakio, serĉas korespondantojn, kiuj ŝatas interŝanĝi kalendaretojn. Interesatoj pri tiu propono skribu al Svisa Radio Internacia por ricevi ŝian adreson.

A.- Ni salutas J. L. HUT en Den Ham, Nederlando kaj s-ron Genadij ZACHEVIĈ en Pelcavo, Sovetio.

Cl.- Otto KACZINSKI en Havelberg, Germanio orienta, sendis 5 mesaĝojn kun kelkfojaj plendoj pri perturboj malhelpantaj la aŭskultadon.

Nia tre regula auskultanto Svetislav KANAĈKI en Waverley, Aŭstralio, sendis 3 mesaĝojn. Li okupiĝas pri regionaj radio-disaŭdigoj, kies tempo etendiĝis de 15 minutoj al duonhora ĉiulunde.

A.- Pro la pli longa tempo, nun mi povas komenci enkonduki ankaŭ la lingvon Esperanto, ne nur la anglan lingvon kaj propagandajn programojn.

Cl.- Kaj li kelkfoje raportas pri sia aŭskultado de Svisa Radio Internacia reaŭdigante programerojn, kiujn li registris.

Cl.- S-ro D. K. KALINKA en Jambol, Bulgario parolas nome de la orienteŭropanoj, kiuj pere de esperanto provas havi internaciajn kontaktojn kaj li alvokas je plilongigo kaj plioftigo de niaj esperanto-elsendoj.

Cl.- Jean-Jacques KASPARFIAN en MEUDON, Francio skribis:

A.- Emociigis nin la prelego de Claude GACOND pri la aŭtoro de "Zamenhofa Ekzemplaro", ĉar lia persistemo por malfacile ellabori sian sliparon dum 17 jaroj montras kiom oni povas amegi la esperantan lingvon. Eble persistemo estas la ĉefa kvalito de la grandaj esperantistoj.

Cl.- Saluton al Arūnas KAZLAUSKAS en Klaipeda, Litovio.

4 dank-mesaĝojn ni ricevis de Karl-Heinz KERSTING en Essen, Germanio okcidenta.

Kaj nun ni fermas nian leterkeston hodiaŭ. Ni daŭrigos la respondadon la venontan semajnon. Nome de Svisa Radio Internacia, Claude kaj Andrée GACOND diras al vi : Ĝis reaŭdo!